


HEROLDO DE ESPERANTO



MONATA INFORMA GAZETO DE KULTURA CENTRO ESPERANTISTA

Numero 1 (2316), 97^o jarkolekto

Esperanto-Domo, Postiers 27, CP 311, CH-2301 La Chaux-de-Fonds (Svislando) - telefono (41)32 9267407 - kce@esperantio.net - IBAN: CH23 0900000230029218

januaro 2021

La senkongresa jaro Ideo ŝatata de la ĝenerala publiko

La kongresoj (se raŭmisme interpretataj, do "kiel vojo al kresko") estas grava kanalo por la E-kulturo. Bedaŭrinde ili ne okazis dum 2020, simile al 1916-19 kaj 1940-46, sed ne same, ĉar unuafoje ne kulpis milito aŭ diktaturo, sed la malpermesoj pro pandemio, en relative paca tempo. Maloftaj esceptoj (kiel la japana) kaj oftaj telematikaj surogatoj (kiel la universala kaj la junulara) ne atingis la kutiman valoron.

Nian kulturon en 2020 subtenis precipe la regula aperado de periodaĵoj, unuavice *Literatura Foiro*, *Kontakto* kaj *Beletra Almanako*, kaj eĉ ilia kresko, ekz. la duobligo de la amplekso de *Heroldo de Esperanto*: ni ĝoju, ĉi-riate, ke la reveno al la tradicia amplekso danke al KCE en Svislando transpaŝos la limojn de la nuna jubilea jaro kaj fariĝos konstanta. Longe vivu la jam 100-jara HdE kaj la pli ol 50-jara LF, pilieroj de la Esperanta Civito!

La senkongresa jaro signifis ankaŭ relanĉon de niaj kulturcentroj, precipe en Francio kaj Svislando. Ankaŭ ĉi tie raŭmismo indikas la vojon, kiel diras la art. 29 de la Konstitucia Ĉarto: *La Civito stimulas la kreon kaj ekspansion de reto da servoj, en formo de ejoj por kulturaj kaj socialaj celoj, nomataj Domoj*. Eŭropo avangardas tiurilate: ĉu baldaŭ ankaŭ Afriko? En tiu kontinento certe avangardas la Afrikaj Esperantologiaj Semajnoj, en Togolando kaj Burundio, ankaŭ sub la aŭspicio de la Esperanta Civito.

La kultura graveco de Eo pli videblas ankaŭ ĉe eksteraj instancoj: endas mencii almenaŭ la implican agnoskon de jen Konsilio de Eŭropo en Strasburgo (rilate al nia lingvotesta kompetento, tra KCE) jen Eŭropa Junulara Fonduso en Bruselo (per la elekto de TEJO-reprezentato en ties kupolo).

En 2003 la Kapitulo aprobis rezolucion, la solan ĝis nun pri UEA. Rimarkinda estas la alineo: *rekonante ke Universala E-Asocio per biblioteko Hodler, per sia jarlibro, sia libroservo kaj organizado de kongresoj plenumas utilajn funkciojn en nia parolkomunumo*; Dek sep jarojn poste UEA ne plu eldonas la jarlibron, sed fordonacas la bibliotekon kaj likvidas la libroservon: restas nur UK (kun eble dujar paŭzo), kiun tamen povas organizi ajna Loka Kongresa Komitato.

Des pli bedaŭrinde, necesas zorgi ke Esperantio ne estu minacata de antisemitismo, kiu de tempo al tempo ĝermas eĉ en ĝia interno. Nia popolo bezonas eviti tian kulturan kontakton, pli ol gripojn el Azio.

Riichi Karibe

Konsulo de la Esperanta Civito



Skribis Federico Gobbo en decembro 2020: *Ekde ties formiĝo, la ĉefa strebo de la E-Movado estis ricevi rekonon fare de la ekstera mondo kiel memstara, sendependa, iel prestiĝa, socia realaĵo. Finfine, la retoriko de la pioniroj pri la fina venko kaj tiu de la bunta panoramo kiu konstituas la arhipelagon de la raŭmismo, tre similas. La devizojn "Ĉies dua lingvo!" kaj "respektu Esperantujon kiel kvazaŭpopolon!" kunigas ĉi tiu komuna sopiro pri rekonon. Por ke Eo ricevu rekonon, la ĝenerala publiko devas scii pri ĝia ekzisto, ne necese koni la lingvon mem. Eĉ pli bone ne koni, tiel oni estas klare kaj senhezite eksterulo en la senteritoria lando kiun ni nomas Esperantujo.*

La vortoj de prof. Gobbo enkondukis recenzon pri la ĵus lanĉita filmo *La insulo de la rozoj*, fikcia prezento pri la fondo de mikroŝtato, kiu havis propran lingvon, en kiu estis skribitaj la konstitucio kaj la oficialaj aktoj: esperanto.

La moresneta mikroŝtato en 1908 ne atingis tiom; nur en 1999 aperos projekto pri subjekto de internacia juro en Eo, kies Ĉarton promulgis dek tri establoj en urbo Sabloneto, 2 jun 01, interalie nia redakcio.

Tamen atentu, ĉar ne temas pri mikroŝtato, kiel klare preskribas la art. 2 de la Konstitucio:

1. *Konforme al la tradicioj establitaj en Bulonjo-ĉe-Mar*

1905, la Civito celas firmigi la rilatojn inter la esperantistoj kiuj sentas sin apartenantaj al senŝtata diaspora lingva grupo, laŭ la difino en la art. 1, par. 5, de la Universala Deklaracio pri la Lingvaj Rajtoj, proklamita en Barcelono la 6^{an} de junio 1996.

2. *La firmigo de tiuj rilatoj realiĝas per la difino kaj pacama evoluigo de komuna kondukodo, transnacia kulturo kaj kolektiva identeco.*

Preparataj dek afrikaj aktivuloj

Dek personoj estis akceptitaj de Afrika E-Instituto por la 6^a AfrES, kiu en februaro 2021 preparos la unuajn stabanojn por la Esperanta Civito en Afriko. Ili estas Mushosi Birindwa, Abdul Rahman Bukuru, Lucien Kagina, Espoir Kasati, Hindu Mujawimana, Shabani Muruta, Ramazani Nanjira, Oscar Nizigiyimana, Abasi Nshimirimana kaj Honore Sebuoro.

3. *Ne estante ŝtato, la Civito ne avidas politikan kaj ekonomian potencon, sed celas klerigan, edukan, kulturan evoluon, en komprenemo kaj toleremo rilate al la diversaj pensoskoloj al kiuj persone aliĝas la civitanoj. Teknologiaj kaj financaj rimedoj devas helpi la liberan kaj demokratian evoluon de la civitanoj, kaj ne utili per si mem.*

Same kiel anti-raŭmismoj eraras (intence) per la atribuo de ŝtateco al la Civito, ili pli eraras ignorante la diferencon inter *demos* kaj *ethnos*, kiam temas pri la nocio de kvazaŭpopolo. Kaj senargumente ili difinas la Civiton jen *ridinda* jen *danĝera*.

La reagoj de la publiko al ĉi tiu filmo, spektebla per Netflix, pravas ke la anti-raŭmismoj ne honestas intelekto, kaj entute ne komprenas la mondon. Al la ne E-istoj plaĉas la ideo: ili ŝatas la revon de inĝ. Giorgio Rosa, kiu sur platformo en la Adriatiko, ekster la teritoriaj akvoj de Italio, lanĉis subjekton de internacia juro. Por kiu li bezonis lingvon, kaj prave li elektis la nian.

Perla Martinelli



Kiaj fakaj asocioj en la nuna jarcento?

UEA perdis (aŭ estas perdonta) diversajn Fakajn Asociojn. Kelkfoje mankas mono, kelkfoje organizantoj kaj kelkfoje mankas ambaŭ. Speciale doloriga estas la perdo de Mondpaca E-ista Movado. Temas pri ege tradicia, faka asocio. Ĝin multaj, pli aĝaj E-istoj memoras. Paco estas afero, kiu ĉiam aktualas, sed se neniu el la nuntempa movado deziras okupiĝi... Tiel lamentas la direktoro de la Universala, Martin Schäffer, en komunikado al sia Komitato.

Mi estas estro de klubo de E-istoj kiuj ludas ŝakon kune interrete kaj oni demandis nin ĉu ni revivigu la Esperanta[n] Ŝak-Ligo[n] Internacia[n] kiu estis faka asocio de UEA. Sed mi ne povis trovi iun avantaĝon en la kreado de formala asocio. UEA kaj TEJO ŝatus fanfaroni pri plia asocio kaj eble iuj ŝatus pompajn titolojn kiel prezidanto, sed tiu nur estas distraĵo de la kerna temo. Se ni volas ludi ŝakon, ni ludu, krei formalan asocion ne helpas nin ludi, iom antaŭe skribis en sia blogo Robert Nielsen, tuj fiaskinta kaj demisiinta TEJO-estrarano.

Helpe al la verkonto de historio pri la lastaj tempoj de la malnova Esperantio, estas utile lasi kelkajn

Lastatempe en TEJO ni ekhavis la ideon por KA2 Strategia Partnereca projekto pri eŭropa agnosko de la roŭma lingvo. Mi preparis la koncepton pri la projekto kaj sendis ĝin al reprezentanto de la Roŭma organizo renkontita dum konferenco de UNITED antaŭ pluraj monatoj, cele al propono de kooperado. Ni ricevis tute nean respondon de la organizo, kiu supozis ke TEJO volas eluzi ilian minoritatan statuson por akiri subvencion. Mi komprenis ilian vidpunkton, klopodis klarigi niajn motivojn. Fine ni interkonsentis ke ili sin proponu kiel kunordigantojn kun TEJO partnere kaj kelkaj korektoj bazitaj sur iliaj ideoj.

Paulina Jalakšová

konsiderojn pri la morto de ĝiaj fakaj asocioj, kaj la naskigo aŭ resurekto, kun eventuala progreso, de aliaj en la nova Esperantio. Al la kialoj indikitaj de s-ro Schäffer necesas aldoni du pliajn, fakte pli gravajn.

Pli ol cent mil eŭroj

Tiom da mono elspezis UEA por krei pli modernan retejon, inter 2013 kaj nun; sed ĝi ankoraŭ ne funkcias.

La elspezon aprobis la Komitato, kies membroj (de A kiel Arquillos ĝis Z kiel Zerbetto) devus redoni la monon al la Asocio, se temus pri normala entrepreno; aŭ procesi kontraŭ la diversaj fakturintoj.

HdE demandis al informadikisto kiom kostus retejo. Li respondis: *Tiom kiom oni sukcesus pagi de la kliento. Sed dependas ankaŭ de la lando; ĉiukaze, pli ol cent mil eŭroj estus tro multe. Aŭ iu profitis, aŭ la kliento estas dupo.*

La unua estas la malamika konduto de UEA (kaj de SAT) rilate al fakaj asocioj kiuj estiĝis en alia kampo: sufiĉas mencii la kazon de Feminisma Esperanta Movado, kies altnivelan revuon *Femina* la Centra Oficejo rifuzis peri aŭ eĉ nur debiti (direktoro: Buller; libroservestro: Onet), kaŭzante la nuligon de ĉiuj peradoj flanke de LF-koop pro solidareco; kaj ni silentu pri SAT, kies tiama gvidanto kaŭzis la protestan eksigon de ĉiuj FEM-anoj el la Sen-nacieca. La tradiciaj movadoj perdas (aŭ ne akiras) fakajn asociojn ankaŭ pro siaj miopa egocentrismo kaj strategia bojkotemo.

La dua kialo rilatas pli specife al la fakaj asocioj mem: ilia mal-kapablo trovi lokon ene de supernacia neE-ista tegmenta organizo. Ekzemple, kiu ekster UEA agnoskis E-lingvan Verkistan Asocion? Neniu. Kaj kio restis el ĝi? vegetanta Akademio Literatura. Male, la verkistoj kiuj kuniĝis en Esperanta PEN-Centro sukcesis atingi la agnoskon de Eo kiel literatura lingvo, kaj ĝi estas respektata branĉo de la plej granda verkista mondorganizo.



Paulina Jalakšová

En tiu ĉi linio, fakte la raŭmismo, situas ankaŭ TEJO, ekde kiam ĝi adoptis la saman strategion: danke al la akcepto en neE-istaj tegmentaj organizoj ĝi fortigis sian pozicion (kio influis pozitive al la sukcesoj ĉe EU-subvencio) kaj eĉ atingis gravajn postenojn, kiel la ĵusan elekton de sia delegitino Paulina Jalakšová, en la kupolo de Eŭropa Junulara Forumo.

Endas aldoni trian konsideron: same kiel Nielsen ne komprenas multon pri la fenomeno Eo (kaj gramatike kaj sociologie), Schäffer scias malmulton pri nia historio, se li kredas ke MEM estis pacifisma organizo: ĝi simple estis referenco por landaj asocioj en komunismaj ŝtatoj, iel alternative al tiu kiu okcidente difinis sin laborista organizo; nature, kiam la orienta bloko ruinis, MEM ne plu havis *raison d'être*, kiel dirus Zamenhof...

Giorgio Silfer

Sendi al vi ekzempleron de HdE kostas unu frankon/eŭron. Dum tuta jaro tio egalas al dek du. Aldonu la preskoston kaj la penon de nia (senpaga) laboro. Adekvata donaco estas justa helpo por Esperanto.

Donacis en 2020

Jordan Aikins 20,-. **Anna Bartek** 180,-. Maria Barta 50,-. Pierre-André Béguin 60,-. **Lorena Bellotti** 183,-. **Pierre Berger** 219,45. Christine Bieri 100,-. Claude Blanc 5,-. Manuela Blanco 10,-. Jean-Daniel Bosko 20,-. **Sonja Brun** 220,-. Jean-Pierre Brunod 20,-. **David Buhlmann** 360,-. Hans-Hermann Buehl 26,60. Tazio Carlevaro 70,-. Joseph Chalverat 50,-. Verena Chaves Walder 55,-. Vincent Chatagny 87,-. **Marie-France Conde Rey** 180,-. John-Arthur Cork 75,-. Carmine Dello Spedale 32,-. Andrée De Keuster Nicolier 110,-. Daniel Elmiger 50,-. **Esperanta Naturamikaro** 360,-. **Esperanta PEN-Centro** 360,-. Chiara Fabbri 20,-. **Feminisma Esperanta Movado** 360,-. Thomas Fruebis 8,-. Alessio Giordano 16,-. Henri-Pierre Glanzmann 60,-. Bruno Graf 20,-. J-D Gubler 50,-. Georges Haldimann 40,-. **Yvette Humbert Fink** 180,-. **Riichi Karibe** 200,-. **Alois Koller** 180,-. **Kooperativo de Literatura Foiro** 360,-. **Jean-Jacques Lavanchy** 180,-. Yolande Leuenberger 60,-. **Franco Levi** 180,-. Ivan Magistrini 20,-. Denis Maret 50,-. **Perla Martinielli** 180,-. Feri Mazlum 50,-. Carlo Minnaja 100,-. **Ulrich Moser** 200,-. Eduard Muster 20,-. **Bertil Nilsson** 180,-. Karin Oertle 80,-. Luciano Orтели 30,-. Giuseppe Pranzo Zaccaria 6,-. **Eliane Purro Lavanchy** 160,-. Bernhard Ruethemann 75,-. **Konrad Rey** 180,-. Dieter Rooke 30,-. Paul Ruegg 100,-. André Sandoz 70,-. **Giorgio Silfer** 180,-. Carlos Spinola 16,-. Irene Thomann 20,-. Maria Wenczel Staeuble 105,-. **Mariangela Varese** 187,-. Erich Werner 20,-. Sume 7.006,05 CHF



kaj prosperan novan jaron!

Al somero 2021!

La kalendaro de kvar semajnoj estas jam difinita de KCE por la venonta somero.

En **julio 27-31** (alvenoj 26): dua staĝo pri **tradukado de internaciaj kaj diplomaciaj dokumentoj** (ĉartoj, deklaracioj kaj deklaroj ktp), sub la gvido de prof. Giorgio Silfer, iama parlamenta funkciulo pri internaciaj rilatoj. Ekskurso la 1^{an} de aŭgusto.

En **aŭgusto 3-8** (alveno la 2^{an}): kvina staĝo pri **literatura tradukado**, sub la gvido de d-ino Perla Martinelli.

En **aŭgusto 10-15** (alveno la 9^{an}): **Esperantologia Fakultato**. Institucia parto kun Giorgio Silfer (kultura historio de la E-popolo), monografiaj partoj kun Alessio Giordano (pri Noam Chomsky) kaj Jordan Aikins.

En **aŭgusto 17-21** (alveno la 16^{an}): **Simpozio honore al Eugenio de Zilah**, enkondukas Vinko Ošlak. Partoprenos diversaj prelegantoj.



La konsorcio de la Esperanta Civito estas granda produkta platformo. Jen la novaĵoj el la aktiveco de kelkaj paktintaj establoj dum la lasta monato. Kiu deziras aliĝi al paktinta establo, tiu sin turnu al pakto@esperantio.net

Fermitaj landlimoj, trudizolo kaj eĉ kurfo blokas ĉiun kulturen aktivecon en Hungario ĝis marto 2021. **Fajzi Amika Rondo** interkonsentis la duonigon de la kontora luprezco en Budapeŝto, kie oni tamen zorgas pri la kresko de la libraro danke al donacoj de ESE en Upsalo (Svedio) kaj IEI en Hago (Nederlando): ĉi-lasto tamen ne plenumis sian proponon.



La Asembleo de **Kultura Centro Esperantista** i.a. ekzamenos la proponon de s-ro Dietrich Weidmann inkludi KCE-paĝon en la retejo de la finvenkisma Svisa E-Societo. Dum la nuna jarcento KCE rilatis al SES nur pro kredito, kun 3% interezo kiun SES donacis ĉiujare. En 2013 KCE pagis al SES sian tutan ŝuldon kaj la rilatoj ĉesis: SES neniom plu subtenis.

Studenta Esperanta Ligo petis de TEJO la aŭspicion pri la 11^a Kultura E-Festivalo, 10-15 aŭg 22. La teamo de la "abeletoj" regule kunsidas skajpe, funkciigas retejon, selektis kaj ekkontaktis la unuajn artistojn, fiksis kalendaron de limdatoj. Ĉiuj "abeletoj" estas apogantoj aŭ donacintoj de KCE, kiu sponsoras la festivalon. Kunordigas c-ino Manuela Blanco.



La fama *Cours de linguistique générale* de Ferdinand de Saussure estas engaĝigata ĉe la librofako de **LF-koop**. La verkon tradukis kaj postparolis c-ano Fernando Pita, prefacis c-ano Alessio Giordano. Tre utila estis la detala provlegado de c-ano Andres Bickel, ĉefa provlegisto de la revuo *Literatura Foiro* dum la lastaj jaroj.

La Domo de Mantegna en Mantuo gastigos la 4^{an} Interlingvistikan Seminarion, organizatan de **Itala Interlingvistika Centro**, 29 maj 21. Kiel prelegantoj estas invititaj prof. d-ro Davide Astori (konfirmota) kaj d-ro Giorgio Silfer. Kontakto okazis kun la Bahaa Nacia Spiritita Asembleo, ĉar la dato koincidas kun la jubileo de Alessandro Bausani, ĝis nun sen respondo.



La kultura revuo **Literatura Foiro** dediĉos al Dante Alighieri siajn kovropaĝojn en 2021, okaze de la 700^a datreveno de la forpaso de la plej universala poeto. En ĉiu numero aperos interesa originala eseo de la plej valora dantisto en Esperantio: d-ro Giuliano Turone. La ĉefredaktoro, c-ino Perla Martinelli, planas ankaŭ la publikigon de nekonataj unikajoj.

La jubilea mondkongreso de PEN Internacia ne okazos en Oksfordo dum septembro 2021, pro timo de la pandemio. Al la centjariĝo (1921-2021), postecelebrotita en 2022 per reala mondkongreso en Svedio, la **Esperanta PEN** dediĉos apartan atenton en sia organo *Literatura Foiro*, per dosiero de c-ano Giorgio Silfer, kandidato al la Nobel-premio por nia literaturo.



Esperanta Naturamikaro kunvokis sian ordinaran Asembleon al Malago pli frue ol kutime: 14 jan 21. Renoviĝos la kvinopa Komitato, kun la konfirmo de la eliranta prezidanto, Julio Herrero, sed ankaŭ interna rotacio. Perla Martinelli iĝos vicprezidanto, Manuela Blanco sekretario, Antonio Vázquez restos kasisto, Herman Deceuninck komitatano pri la retejo.

En la Internacia Tago por la Elimino de Perforto kontraŭ Virino manifestiĝas la kruda vero de la nombroj: kie la aŭtoritatoj enkondukis trudizolon preventive al la nuna pandemio, tie multiĝas la kazoj de feminicido; kvazaŭ resti enfermita hejme favorus la krizon de la paroj kaj stimulus virojn al mortigo de la partnerino.

Bonŝance la fenomeno restas nekonata en Esperantio, kiu pormomente konas nur kreskon de kazoj de ordinara molestado. Sed estas bedaŭrinde ke E-asocioj kiuj deklaras sin progresemaj tamen ignoris ĉi tiun tagon, deklaris sen. Manuela Blanco, vickonsulo pri socialaj aferoj, esprimante sian solidarecon al Feminisma Esperanta Movado, aliĝinta al la Pakto por la Esperanta Civito. Krom eraro, la Civito estas la sola subjekto en Esperantio kiu memoris pri ĉi tiu Tago kaj publike esprimas engaĝon por kulturo sen perforto kontraŭ virinoj, prioritata celo de FEM.



7^a Lingva kolokvo

KCE organizos sian 7^{an} Lingvan Kolokvon en Ĉaŭdefono, fine de aprilo – komence de majo 2021, en fizika alesto.

Eblos ankaŭ telematika partopreno; necesas sendi aliĝpeton kaj atendi respondon: ja la kolokvo postulas certan lingvan nivelon.

Dum la unuaj du tagoj kunvenos terminologia rondo pri lingvistiko; sekvos prelegoj kaj asembleoj (de KCE kaj LF-koop). Vespere la agendo proponas distran programon. La asembleoj estas aparte gravaj, ĉar ili renovigos la estrarojn.

Enketo pri UEA

En aŭgusto 2020 UEA kaj TEJO entreprenis retan enketon por esplori, kial oni (mal)aliĝas al ili, kaj ĉu indus ŝanĝi la kotizaron por varbi pli da homoj.

La plej ofta respondo al la demando pri "kromaj kialoj por ne membriĝi": la kotizo estas tro alta. Krome estas tro komplike aliĝi aŭ pagi. Plie pluraj mencias, ke la membreco ne donas sufiĉe da avantaĝoj.

El la nemateriaj kialoj ne membri en UEA aŭ TEJO, plej ofte estas menciita manko de fido je la gvidantoj de la asocioj, precipe pro malkonsento pri la politiko de la asocio.

Kelkaj mencias ankaŭ malefikan administradon aŭ fuŝan komunikadon, kaj nesufiĉan atenton pri loka agado.

Responde al demando pri la ĝenerala funkciado de la asocioj multaj plendas pro manko de subteno al kaj kontakto kun loka agado: oni volas vidi pli konkretan agadon kiu pli proksimas al la membraro.

Finvenkistoj atakas japanan eldonejon

La kunprezidantoj de Svisa E-Societo (Mireille Grosjean kaj Dietrich Weidmann) dissendis alvokon por batali jure kaj amasmedie (ĉu eĉ per aikido?) kontraŭ japana entrepreno kiu "piratis la sanktan nomon" de la organo de UEA. La prezidanto de la Universala aliĝis al la premo tiurilate, dum Japana E-Instituto sekvas malpli sangosoifan taktikon.

Laŭ la Konsulo de la Esperanta Civito, mem japano, *la eldono de la periodaĵo ESPERANTO surprizis nin, ĉar ĝi celas informilon de la kulturoj pere de la angla lingvo. Ili kredas, ke la angla lingvo estas internacia lingvo kaj oni povas dissendi informojn kulturajn vaste en la mondon kaj por tio, la titolo ESPERANTO estus la plej taŭga simbolo/ŝlosilo vorto de la gazeto. Al ni aspektas, ke ili uzas la vorton esperanto nur kiel simbolon de internacia komunikilo. Ni vidas kun intereso kiel JEI traktas tiun aferon.*

Lingvotestaj sesioj

En la Tago de la Esperanta Kulturo 2020 okazis lingvotesta sesio de KCE, komisie de la Esperanta Civito, en Malago ĉe la naturamika E-Domo. C-ino Manuela Blanco atingis la B2-diplomon laŭ LTSEC. Du aliaj hispanaj kandidatoj, por C1-diplomo, jam antaŭ la ekzameno estis taksataj kiel nesufiĉaj.

En dato 7 feb 21 disvolviĝos lingvotestado ĉe Afrika E-Instituto en Bujumburo. La ekzameno fermos la sesan Afrikan Esperantologian Semajnon, cele al la formado de kadroj por la E-popolo.

Asembleo de KCE



Lorenà Bellotti

La ordinara Asembleo de KCE estas kunvokita al la E-Domo en Svislando, 1 maj 21, je 14h00 en unua kaj 14h30 en dua kunvoko, por diskuti laŭ la suba tagordo:

- 1) Komunikoj de la prezidanto.
- 2) Raportoj pri la jaro 2020.
- 3) Elektaj (Komitato, revizoroj).
- 4) Programo 2021-23.
- 5) Diversaj kaj eventualaj.

Ĉiuj elirantaj komitatanoj rekandidatiĝas, tamen kun ioma rotacio: d-ino Lorena Bellotti kandidatas al la prezido.

Dum el Svislando fanatikaj finvenkistoj tamtamas por batalo, en Japanio oni strebas serene diskuti kun la eldonejo, eventuale enkonduki rubrikon en Eo.

Principe la problemo ne ekzistas, se la revuo de UEA havas ISSN-registron. Aliflanke, publika atentigo pri la diferenco kaj la rajtoj estus oportuna, por ke japanaj klientoj abonintaj la novan gazeton, sed eventuale ne ricevontaj ĝin, ne postulu repagon de Roterdamo... **HeKo**

La nefermita letero de Svisa E-Societo utilas nur kiel ekzemplo pri tio, kiel oni ne verku nome de landa asocio. En 2020 oni ne parolu pri la *sankta tasko protekti nian spiritan havaĵon*. Eviti sektemon ne estas postulo nur por la ekstera informado sed ankaŭ por la komunikado inter ni mem. Didi, kiu verkis la leteron, devus dormi unu plian nokton antaŭ ol dissendi ĝin. Tiam li eble rimarkus, ke meze de la letero subite ekparolas "mi" anstataŭ "ni", kio igas suspekti, ke Mirejo eble eĉ ne vidis la tekston, kvankam ŝia nomo aperas sube. **Osmo Buller**

KCE-libroservo proponas por januaro

Karolo Piĉ: *Angoro*, originala poemaro. 96 p. 21,80 CHF
Karolo Piĉ: *La bermuda triangulo*, originala novelaro. 186 p. 48,- CHF
Karolo Piĉ: *La litomiŝla tombejo*, originala romano. 276 p. 39,- CHF
Karolo Piĉ: *La mortsonorilo de Chamblay*, krimromano. 239 p. 43,- CHF
Karolo Piĉ: *Obsedo*, originala poemaro. 143 p. 25,50 CHF
István Nemere: *Krokize de mia ĝardeno*. 60 p. (A4) 15,- CHF
C. Minnaja - G. Silfer: *Historio de la esperanta literaturo*. 54,- CHF
William Auld: *Paŝoj al plena posedo*, didaktika krestomatia. 24,- CHF
Mendebaj tra <kce@esperantio.net>. Plus eventuala sendokosto.

Afriko en la fokuso de la Kapitulo

Dum sia skajpa kunsido 16 dec 20, laŭ monata kadenco sub la prezido de la Konsulo (sen. Riichi Karibe), la Kapitulo de la Esperanta Civito registris delegorotacion.

Ekde Novjartago 2021 pri bibliotekoj okupiĝos sen. Conde Rey (vickonsulo pri klerigado) kaj pri kulturaj projektoj responsos sen. Manuela Blanco (vickonsulo pri socialaj aferoj); de ĉi-lasta la delego pri la tempobanko transiros al sen. Giorgio Silfer (vickonsulo pri financoj). La Unua Vickonsulo (sen. Julio Herrero), malsana jam de pluraj monatoj, restis do kun du delegoj el kvar.

La Kapitulo aŭskultis raporton pri antisemitisma epizodo kaj, laŭ

dokumentoj kaj atesto, konstatis ke la artikolo aperinta en la organo de la Sennacieca dum 2016 estas aŭtente verkita de la koncerna aŭtoro, kiu en 2018 eldonis eĉ libron pri la sama temo, espriminte seniluziigon pro la manko de subteno al siaj tezoj. Kvankam distancigo de SAT, aŭ almenaŭ de la redakcio de *Sennaciulo*, estintus oportuna, la Kapitulo opinias ke la epizodo ne makulas la reputacion de tiuj du subjektoj tiel multe kiel asertas la (ofte nefidinda, vidu pri la Civito mem) Vikipedio en Eo. Restas la responso de la aŭtoro, sed pri tio la Civita ekzekutivo, kiel esence administra instanco, preferas lasi la parolon al la ĉefa politika brako, nome la Senato: eventuale sufiĉos komuna deklaro de la parlamentaj grupestrinoj.

La Kapitulo ĝojas pro la laboro de Studenta Esperanta Ligo, preparanta la 11^{an} Kulturan E-Festivalon por aŭgusto 2022 en Svislando (partnere al KCE), kaj havas nenion kontraŭan al la fakto ke ankaŭ Tutmonda E-ista Junulara Organizo aŭspicias ĝin, kiel jam okazis por JARTE en 2017.

La kunsido dediĉis atenton ankaŭ al la projektoj en Afriko, laŭ raporto de la vickonsulo pri financoj. La Konsulo konfirmis ke li kunvokos parlamentan sesion en Buĵumburon (Burundio), se eblos inaŭguri tie la Tanganikan E-Domon, kun la afrika legacio kaj kun Afrika E-Instituto, partnero de KCE. Ĝuste tial deko da selektitaj Civitaj stabanoj estas trejnotaj dum la 6^a AfrES, 1-6 feb 21.

Kiel estroj de la Verda grupo (majoritata), respektive de la Blanka grupo (opozicia), ni scias ke la leĝodona povo en la Esperanta Civito devas kongrui kun la Universala Deklaracio pri la Homaj Rajtoj.
Negaciismo, inkluzive de la kulpigo al hebreoj pro la Holokaŭsto, nome la delira aserto ke ili meritis la ekstermon, draste kontraŭas la Deklaracion. Persono kiu subtenas tiajn tezojn ne povas esti Civita parlamentano: la Esperanta Civito ne toleras formojn de politika konformismo aŭ ec indiferento – ĉe ni ne eblas epizodoj kiel en 1934, kiam membro de la nazia partio estis elektita al la estraro de Universala Esperanto-Asocio kiel vicprezidanto.
Konsekvence (manke de publika demento) ni deklaras ke neniu grupo reprezentata en la Senato konsentus pri eventuala kandidateco de la civitano (CEN-kodo M090541CR) kiu aŭtoris antisemitan artikolon en la revuo *Sennaciulo* (n-ro 3/4, marto-aprilo 2016).
Lorena Bellotti, Verda grupestro
Anna Bartek, Blanka grupestro
18 dec 21



Antaŭ cent jaroj, la 6^{an} de decembro 1920 en Litomyšl (tiam en Ĉeĥoslovakio) naskiĝis Karolo Piĉ, unu el la plej rimarkindaj E-verkistoj, kies ĉefverko estas la romano *La litomiŝla tombejo*.

Aleksander Korĵenkov

Kun ioma angoro mi memoras miajn sendormajn noktojn, post laciga labortago, kiam mi estis juĝanto de la Premio R. Schwartz kaj devis legi kaj pritaksi ĉi lingve cerbumigan konkursintan romanon.... Plu agacas min ĉi rememoro....

Nicolino Rossi

Tiun premion Piĉ ne gajnis; sed *La litomiŝla tombejo* trafis la premion La Verko de la Jaro 1981.

Literatura Foiro

Stranga lingvaĵo kiu superombras kaj eĉ parte viŝas la rakonton.

Gerrit Berveling

Mi rememoras kiam vi venis al la libroservo de UEA en Rotterdam kaj vi aĉetis ĝin, post agrabla longeta konversacio kiun vi havis kun Simo Milojeviĉ. Mi estis modesta volontula libroservisto, kiu tamen subaŭskultetis.

Alex Humet

Gerrit Berveling

Ĝi pacienas en la ŝranko...

Alex Humet

Same ĉe mi...

Min agacas ankaŭ la tipografia aranĝo...

Nicola Ruggiero

Ĝuste la kursivo plej multe iritas miajn okulojn...

Hans Becklin

Mi deziris legi ĝin, sed terura eldonaĵo min haltigis. Kiel bibliofilo mi fizike ne povas teni en la manoj aĉe eldonitajn librojn. Ĉi-foje, laŭ mia memoro, tiparo estis tro eta.

Stanislavo Belov

La libro plurflanke, plurperspektive, estas tute nelegebla por ordinara E-isto. Oni devas simple miri, ke ĝi atingis ian ajn sukceson. Al tiuj, kiuj eltenis dum plena legado, ĝi donis veran, novan angoron. Piĉ estas mistera figuro en Esperantujo. Li ŝajne estas malmulte konata, kaj la detaloj pri lia akademianigo estas nebulaj. Mi tre ŝatis lian libron *La Mortsonorilo de Chamblay*. Sed preter tio, laŭ mia taksado li estas tute ignorinda.

Lee Miller

La Litomiŝla tombejo de Karolo Piĉ estas rimarkinda verko el pli ol unu vidpunkto, kaj ĝia famo evidente restas eĉ post pli ol dudek jaroj. La romano estas vivhistorio pri viro, ekde infanaĝo ĝis maljunigo. Temas pri homo tre soleka kaj stampita de malfavoraj spertoj. Ni sekvas liajn lerneajn jarojn, universitatajn studojn, dummilitan restadon en koncentrejo, profesion laboron kaj esperantistan vivon. Antaŭ ĉio, super ĉio kaj sub ĉio tamen temas pri liaj seksaj revoj kaj spertoj – aŭ eble nur fantazioj.

Sten Johansson

Piĉ kaj liaj verkoj aparte plaĉis al sia eldoninto Reinhard Haupenthal kaj al ties amikoj, ekz. Ed Borsboom. Admiris lian prozon homoj de antaŭaj generacioj, kiel Juan Régulo kaj Fernando de Diego, ankaŭ kuplitaj al Haupenthal. Kaj sur la sama ondo lulis sin la “ibera skolo”.

Heroldo de Esperanto

Misŝanca debuto por Esperanto-Scacio



La fervoja reto maldensigas kaj en Eŭropo multaj stacidomoj vakas. En la vilaĝo Halbe (30 km sude de Berlino) junaj E-istoj sukcesis akiri unu el tiuj nmoveblaĵoj en 2019.

La eksaj stacidomo kaj stokejo nun nomiĝas *Esperanto-scacio*. Entute 1.200 m² iom post iom renovigataj kaj disponeblaj por E-celoj kaj aliaj internaciaj renkontoj. Ralf Gion Frölich estas la plej aktiva en ĉi tiu privata projekto.

La domo havas tri etaĝojn (sume 800 m²). Nun ĝi eksimilas al junulgastejo kun dek dormoĉambroj kaj komuna banĉambro, plus salonoj.

Brila programo estis preparita por 2020, kun renkontoj, seminarioj, ekskursoj. Bedaŭrinde la pandemio kaŭzis la nuligon de la programo. Certe al *Esperanto-Scacio* mankis la tradicio de KCE aŭ Greziljono, kiuj sukcesis realigi aranĝojn. Espereble la projekto daŭros.

Lastatempe okazis bedaŭrinda afero por nia E-komunumo.

La 15^{an} de decembro 2020, Zamenhof-tago, anglalingva revuo *Esperanto* estis eldonita de Gutenberg Orchestra en Japanio. La redaktoro, s-ro Sugatsuke, mem klarigis la kialon nomi sian ellaboraĵon *Esperanto*, menciinte la nomon kaj ideojn de Zamenhof kaj la inspiron donitan de li. Jam eldoniĝis dek mil ekzempleroj kaj *Esperanto* celas tutmondan merkaton.

Tamen estis pruvo montri ke la redaktoro provas registri sian revuon kiel varmarkon por ekskluziva uzo de la nomo “esperanto” por gazetoj. Tio estas “proprigo de alia kulturo” kaj sendube estas minaco al nia jam ekzistanta kaj konata revuo *Esperanto*.

UEA-estraro jam estas informita pri la problemoj kaj komencas reagi koncerne al leĝaj aferoj.

Krom tiu leĝa proceso, necesas ankaŭ uzi la forton, potencon de la tuta komunumo por ĉesigi la agadon de Gutenberg Orchestra. Ni ne perforte, sed poverte kondamnu ĝian intencojn forrabi la nomon de nia lingvo.

Bonvolu disvastigi ĉi tiun mensagon kaj informi viajn E-istajn konatojn pri la okazintaĵo. Ĉiu eta subteno ja valoras por protekti nian revuon.

(Universala Esperanto-Asocio)

Ne estas la unua fojo ke Roterdamo spertas similajn problemojn. Antaŭ kelkaj jaroj, laborante super la restrukturata asocia retejo (kiu ĝis nun kostis cent mil eŭrojn, sed ankoraŭ ne funkcias) iu oficisto esploris pri mencioj de UEA en la reto.

Li malkovris ke en Edinburgo ekzistas societo kun limigita respondeco, kies nomo estas Universala Esperanto-Asocio! Rapida enketo kondukis al surprizo: la skota UEA havas la saman adreson de d-ro Francesco Maurelli, edzo de UEA-estrarano... Kial li registris tiun entreprenon sub tiu nomo, eble estis ŝerco. Almenaŭ tiel la tuta afero estis arkivita.

Negativaj ecoj en la bildo de TEJO: kial?

TEJO fariĝis junulara sekcio de UEA meze de la 1950^{aj}, kaj dum deko da jaroj ĝi progresis kiel “UEA en mallonga pantalono”, fortigante sian strukturon, multigante siajn sekciojn, ekspansianta kongrese, kreante novajn servojn (ekz. la revuo *Kontakto*). La bildo, ĝenerale pozitiva (ja kial malamiki al gejunuloj?), suferis pro generacia konflikto ekde la 1970^{aj}.

Tiam la kerna kritiko devenis de la akuzo pri malrespekto de la statuta neŭtraleco. Vera aŭ supozata, tiu akuzo iĝis parto de la konflikto kiu kondukis al la fino de la Lapenna-epoko kaj al la eko de la Tonkina. Hodiaŭ, post kiam la Universala mem estis diplome honorita kiel ĉefa subtenanto (?!?) de la *liberiga milito de Vjetnamio kontraŭ la usona agresanto*, tiu akuzo ja eksmodas, same kiel la tiama generacia konflikto.

Fine de la 1990^{aj} ekis alispecaj atakoj kontraŭ la bildo de TEJO. Tiuj atakoj paralelis al la kreskanta bezono de sendependeco ĉe la Junulara, kun diversaj momentoj de malstabila ekvilibro, el kiuj la lasta estis atingita per la statut-reformoj de la du organizoj (2016). La du ĉefaj polusoj de la konflikto nun estis la junularo kaj la burokrata aparato, survoje al la fino de la Buller-epoko kaj al la likvido de la Centra Oficejo en Roterdamo.

Post la marginigo de la bullerismo ene de la statutaj instancoj,

la negativan bildon de TEJO nutras atakoj precipe en formo de skandalisma denuncado, kies voĉtubo estas s-ro Kalle Kniivilä (“persona non grata” kaj en la Rusa Federacio kaj, multe pli frue, en la Esperanta Civito) kaj liaj kunlaborantoj (interalie s-ro Robert Nielsen, tiel efemera kiel fuŝa TEJO-estrarano, nun eĉ malaperinta el la Komitato). La akuzoj ne koncernas mankon de politika neŭtraleco, sed mankon de travideblo kaj interna demokratio, defraŭdon ĉe publika financado, mensogadon pri membronombroj, intereskonflikton, seksan molestadon aŭ malsufiĉan genran egalecon: vere aŭ nur supoze.

Sur tute alia fronto, la pozitivan bildon de TEJO perturbas ne la supraj akuzoj (aŭ klaĉoj), sed malfidemo pro troa kuplitateco al UEA kaj malsufiĉa engaĝo favore al afrikanoj: tio klarigas la rezulton de la enketa referendumo pri eventuala kolektiva (kaj senpaga) aliĝo de la juna Civitanaro al TEJO.

Lastatempe la Junulara pli kaj pli involviĝas en la krizo de la Universala, anstataŭ distancigi: kio des pli pravigus la sintenadon okaze de la menciita referendumo. Tre zorgiga estas ankaŭ la multigo de dungitoj kaj salajratoj: ĉio sume, ŝajnas ke, en duona jarcento, de TEJO kiel “UEA en mallonga pantalono” oni alvenis al “UEA kiel maljunulara sekcio de TEJO”...

Kortrejko ĉesis

La plej gravaj biblioteko kaj heme-roteko en Belgio ĉesis ekzisti: s-ro Ronald Rotsaert ne sukcesis eviti la demobilizon de la fama fondaĵo Vanderbriet en Kortrejko – 8.500 libroj kaj pli ol 10.000 jarkolektoj de periodaĵoj.

La libraro iris al antverpena biblioteko, dum la hemerotekon akiris s-ro Marc Van den Bempt, kiu mem posedas grandan privatan bibliotekon en Luveno. Tamen ĉi tiu trezoro ne restos en Belgio: nova asocio, Internacia E-Arkivo, estis fondita 20 nov 20, kun la celo kolekti, arkivi, protekti, administri kaj igi alireblaj librojn, revuojn kaj aliajn dokumentojn en kaj pri Eo kaj planitaj lingvoj, en sia originala formo; kaj baldaŭ ĉio translokiĝos al Slovakio, kondiĉe ke...

Kondiĉe ke oni trovu pliajn 50.000 eŭrojn por aĉeti domon, utilan por IEA sed ankaŭ por la entrepreno E@I, kiu finfine havus propran ejon.

Esperanto-vilaĝo?

UEA aĉetis en Roterdamo domon por volontuloj. Pli bone estus forvendi CO-n kaj aĉeti tutan vilaĝon en suda Italio, Hispanio aŭ aliloke. Tie estas spaco por ĉiuj fakoj kaj suborganizoj kaj por tuta volontula popolo...

Diferenco de la nuna projekto estas en tio ke nun ni planas vilaĝon ne por propagandi ekologian vivmanieron sed por koncentri E-istojn en unu geografian lokon por ekhavi konstantan minimuman nombron de E-istoj surloke por garantii viglan vivon de E-kulturo. La projekto baziĝas sur spertoj akiritaj je la kampadejo en Primosten (dua Jugoslavio).

Kial ni perdis Primoŝtenon?

La E-kampadejo estis tre taŭga por E-istoj pro malmultekosteco. Sed iom post iom la marborda vivo kaj komerco en Primosten evoluis al novaj modernaj multekostaj grave profitodona konstruoj kaj tio multe reduktis la kvanton de E-istoj tie. Fine ĝenerala turismo elpremis E-istojn el Primosten.

Se lokon posedas multaj E-istoj private, do tio ne okazas. Se el cent E-istoj privataj somerdometoj dek transiras al ne E-istoj, tiuj dek ne sukcesas elpremi najbarojn. Male, ili mem devas adaptiĝi kaj ekuzi Eon, aŭ vendi sian dometon malmultekoste al iu nova E-isto kaj foriri en alian lokon.

Peeter Aitai

Kultura Esperanto-Festivalo

La Chaux-de-Fonds (Svislando)
10-15 aŭgusto 2022

Spuroj de literatura tradicio el Nepalo

Malgraŭ sia riĉa historio, la literatura tradicio de Nepalo ankoraŭ estas relative nekonata al la internacia legantaro. Laŭ tradukisto kaj esploristo Mahesh Poudel, la nepala literaturo ankoraŭ estas plejparte ekskludita de literaturaj publikaĵoj fokusigantaj pri la regiono, kaj ĝi malofte aperas en gravaj internaciaj antologioj kaj periodaĵoj.

En novembro 2019, la usona *Global Literature in Libraries Initiative* (GLLI, Iniciato por Globa Literaturo en Bibliotekoj) aranĝis virtualan nepalan literaturan mo-naton por montri tiun literaturon al internacia spektantaro. En junio 2020, Tutmondaj Voĉoj intervjuis GLLI-ĉefredaktiston **Karen Van Drie**.



GV: Kio estas la perspektivo de la nepala literaturo (aŭ verkita en la angla aŭ tradukita en la anglan) en la tutmonda literatura mondo? Kaj kio estas la estonteco de tradukita literaturo en Okcidento?

KVD: Anglalingvaj kulturoj ne estas tiel malfermitaj al tradukita literaturo kiel ili devus esti. Niaj landoj estas fizike tiom grandaj, ke estas malfacile por ni, kiel legantoj, resti informitaj pri la produktado de niaj propraj eldonejoj, sen paroli pri libroj el aliaj kulturoj. Ĉi tio tamen estas la malĝusta sinteno, ĉar ni povas lerni tiom multe de aliaj nacioj. Nuntempe nur 3% el tio, kio estas eldonata en Usono ĉiujare, estas tradukita el alia lingvo.

Sed estas du signoj preter literaturo kiuj montras, ke la situacio povus pliboniĝi. Unuafoje fremda filmo, *Parazito*, el Suda Koreio, estis ĵus elektita kiel la plej bona filmo ĉe la Oskaroj. Ankaŭ Netflix provizas sian kinotekon per elektoj el la tuta mondo. Kaj la tria promesplena signo estas, ke novaj eldonejoj komencas produkti tradukitan literaturon.

Ĉiuj ĉi tendencoj povus instigi la anglalingvan leganton esti pli akceptema pri provado de libroj el foraj kulturoj.

Kiel la nepala literaturo povas iĝi pli videbla? Ĉu vi havas proponojn kiuj povus helpi la nepalan literaturon lasi sian spuron internacie?

Por ke la nepala literaturo estu pli videbla de la tutmonda legantaro, mi serĉus manieron transformi ĉiun eblan turistojn kaj vizitanton de Nepalo en eblan rekomendanton de tiu literaturo.

Kiam iu petas informojn pri Nepalo antaŭ ol veni, ĉu tiu ankaŭ ricevas informojn pri loke verkita literaturo? Ĉu ĉiuj engaĝitoj en la internacia turismo havas tri hejmkultivitajn titolojn, kiujn ili rekomendas al eksterlandaj vizitantoj kiel bonajn legaĵojn? Ĉu propagandantoj pri literaturo en Nepalo petas siajn ambasadorejojn aperigi aŭtorojn en iliaj Facebook-fluoj, ekzemple? Ankaŭ sendi nepalajn titolojn al konkursoj pri libro-premioj estas mirinda maniero lasi iun alian fari vian reklamadon, se libro gajnos.

Mi rimarkis, ke nepalaj titoloj ne tuj aĉetebblas kiel e-libro. Kiam iu legas recenzi, tiam tiu plej emosaĉeti libron. Tiu libro devas esti tuj disponebla elektronike.

Mi ŝatus aldoni, estas ke kiam homoj serĉas specife librojn pri Nepalo, ili plej verŝajne unue vidos librojn pri la plej grandaj problemoj de la lando verkitajn de fremdaj verkistoj, ne nepalaj verkistoj. Ili juĝas libron laŭ ĝia kovrilo; do igu ĝin kiel eble plej alloga kaj konkurencema. Certigu, ke la eventoj kaj aferoj, kiuj plej kaptas la atenton en Nepalo, estas verkitaj de lokaj verkistoj.

Vi havas jardekojn da sperto ĉe la alportado de literaturo al bibliotekoj. Kiel nepalaj eldonistoj povas trovi manierojn atingi tutmondajn bibliotekojn?

1) Investu, kiel nacio, en mirindaj tradukaj kapabloj. Tradukistoj estas senĉesaj rekomendantoj de aŭtoroj.

2) Havu literaturan festivalon, kiu montras librojn kaj nacian. Mi pensas, ke vi jam faras tion.

3) Dum la literatura festivalo povus esti kunulara programo por eldonistoj interesitaj pri la kreiva produktado de via nacio. Alportu ilin dum tri tagoj, je ilia propra vojaĝkosto, por renkonti kaj saluti eldonistojn kaj ekscii pri la verkistoj kaj ilustristoj de Nepalo. Entuziasmigu ilin publikigi viajn librojn en sia propra lingvo.

4) Kiuj anglalingvaj merkatoj havas afinecon kun Nepalo? Ekzemple, en la usona ŝtato Kolorado, amuza afero kiun homoj faras estas krei ĉiun marŝon sur ĉiu monto en la ŝtato kiu altas pli ol 14.000 futojn [4.267 metrojn]. Estas 54 el ili. Mi imagas, ke la homoj de Kolorado povus multe interesiĝi pri aferoj rilataj al Nepalo. Kiel vi povus atingi ĉi tiujn specifajn merkatojn?

5) Ne subtaksu la potencon de via tradicia kuirarto por vekti la intereson de homoj tra la mondo pri via literaturo. Kuirlibroj rilataj al la nepala kuirarto kaj natura advokato por via kuirarto, kapabla kuiri kaj enmerkati la librojn en la angla, estas ekscita enirpunkto por malkovri la kulturon.

Sangita Swechcha
tradukis Herman Dekeŭnink

La historio de la sarajeva Hagado

Pli ol cent jarojn kaj dum la turbulema bosnia historio, la loĝantoj de Sarajevo protektis la Hagadon, skribitan kolekton de hebreaj reguloj kaj tradicioj. Ĝia hejmo estas la Nacia Muzeo de Bosnio kaj Hercegovino, kiun la Hagado devis lasi kelkfoje por esti konservata.

La Hagado estas skribita kolekto de religiaj preskriboj kaj tradicioj uzita por festi Pesahon (Paskon), la feston kiu celebras liberigon de la hebrea popolo el sklaveco en Egiptio. Hebreaj familioj tradicie legas tekstojn de Hagado dum Pesah, kio signifas ke ekzistas sufiĉe granda nombro el tiaj libroj. La sarajeva estas verŝajne unu el la plej famaj el ili.

La Nacia Muzeo de Bosnio kaj Hercegovino notas ke la sarajeva Hagado estis skribita en Barcelono ĉirkaŭ 1350. Pro la persekutado de hebreaj en Hispanio ĝi vojaĝis tra Italio en la 16^a kaj 17^a jarcentoj, kion atestas notoj sur ĝiaj paĝoj, antaŭ ol veni al Bosnio kaj Hercegovino en nekonata tempo antaŭ la fino de la 19^a jarcento.

La sarajeva Hagado enhavas unikajn figurajn reprezentaĵojn kaj estas la sola Hagado el tiu epoko kiu konserviĝis komplete.




Foto el la Nacia Muzeo de Bosnio kaj Hercegovino. Uzita kun permeso.

La sefarda Cohen-familio el Sarajevo pro malbona financa situacio decidis vendi sian Hagadon. Unue ili ofertis ĝin al diversaj judaj asocioj, sed neniu povis aĉeti ĝin. La Nacia Muzeo estis establita de la registaro de Aŭstrio-Hungario, do ĝi havis sufiĉe da mono por elaĉeti ĝin kaj tiel en 1894 ĝi aĉetis la Hagadon kontraŭ 150 kronoj. Ni plu havas aĉetan kontrakton en nia dokumentaro, diras kuratoro Lejla Becar.

La Hagado estis poste sendita el Sarajevo al Vieno por analizo kaj revenis al Bosnio kun certaj problemoj post kelkaj jaroj.

En 1941 la Nazia Germanio okupis Bosnion kaj Hercegovinon kaj, helpe de la marioneta reĝimo kiun la Akso establis en Kroatio, okazigis la Holokaŭston kontraŭ la bosnaj judoj. Dum kvar jaroj dek mil estis murditaj en Bosnio, kie loĝis dek kvar mil judoj. Becar klarigas kio okazis al la valorega libro en tiu tempo:

Germanaj trupoj kolektadis judajn artaĵojn tra Eŭropo por formi muzeon de pereinta civilizo. Sarajevo deziris nur la Hagadon. Kuratoro Derviš Korkut – klera homo – okupiĝis pri tio. Kiam la direktoro de la muzeo Joza Petrović informis lin, ke la germanoj

venis, li kaŝis la Hagadon en sia pantalono kaj diris ke ili transdonis ĝin al alia oficisto matene. La germanoj venis por serĉi tiun oficiston, kreitan en la imago de Derviš kaj Joza, dum tiuj du plu pensis kion ili faru kun la Hagado.

Kun granda risko, Korkut kaŝis la Sarajevan Hagadon en moskeo en muzulmana vilaĝo en la montaro Bjelašnica, kie ĝi restis ĝis la fino de la dua mondmilito. Poste ĝi estis redonita al la Nacia Muzeo en Sarajevo.

La sarajeva Hagado estis sub risko denove dum la sieĝo de Sarajevo (1992-1996). La Nacia Muzeo troviĝis ĉe la frontlinio kaj suferis severajn damaĝojn. Kune kun multaj aliaj valoraĵoj, la Hagado estis translokita sub la volbon de la Nacia Banko, kie ĝi restis ĝis la fino de la Bosnia milito.

La sarajeva Hagado postvivis la inkvizicion, du mondmilitojn kaj la militon en Bosnio kaj Hercegovino. Ĝi havas bosnan nafaka (*bonŝancon*) vikle diras Becar.

Por Luka Bošković, longdaŭra volontulo de la Nacia Muzeo, dum kultura riĉeco de Bosnio kaj Hercegovino estas valorega, junaj generacioj malmulte scias pri graveco de la Hagado.

Redukti suferon

Japana monaĥo, kiu faras muzikon por redukti timon kaj suferon, estas rekompencita per milionoj da aŭskultantoj.



Yogetsu Akasaka, 37-jaraĝa Zen-budhana monaĥo, uzas buklostacion por kombini kaj kovri taktbokson kun budhana ĉantado, kaj poste alŝutas la filmetojn al YouTube.

Lia plej populara filmeto atingis du milionojn da spektantoj. La moderna interpretado de *La Kora Sutro* fare de Akasaka, historie unu el la plej konataj kaj popularaj sutroj, fulme disvastiĝis en YouTube en majo 2020.

La budhisma monaĥo kombinas taktboksajn buklojn kaj taktojn ĉantante diversajn tradiciajn budhismajn sutrojn, aŭ skribaĵojn, en sia jutuba kanalo. La celo estas helpi redukti suferon.

Antaŭ ol monaĥiĝi, Akasaka vivis eksterlande kiel stratmuzikisto. En 2009 li komencis kombini taktboksadon kun voĉaj tavoloj kaj de tiam aldonis budhisman ĉantadon al sia repertuaro.

Akasaka, kiu nun loĝas en Tokio, fariĝis Zen-monaĥo en 2015, sekvante la paŝojn de sia patro, kiu nun estras templon en Iwate.

Kutime en Japanio homoj monaĥiĝas ĉar ilia familio loĝas en templo. Sed rilate al mia patro, li estis nur normala homo, kiu decidis fariĝi monaĥo. Li inspiris min kaj mi decidis sukcesi en la nuna rolo de mia patro kiel abato de templo en la kampara gubernio Iwate.

Eĉ antaŭ ol lia versio de *La Kora Sutro* fulmrapide disvastiĝis, la muziko de Akasaka kaptis atenton en Japanio. Ĝi aperis ĉe Techno Hosho 2019, koncerto okazinta kiel parto de la pli granda ĉiujara evento Chokaigi, kiu kombinas budhismajn ritojn, tekno-muzikon kaj projekcion.

Akasaka ne estas la sola interpretisto, kiu miksis budhismon kun nuntempa muziko. Ĉe Techno Hosho 2018, prezentisto nomata Gya miksis teknon kaj tranĉan muzikon kun budhisma ĉantado.

Nevin Thompson
tradukis Herman Dekeŭnink



La Koro Sutro, originale komponita de Lou Harrison kun teksto en Eo, estis la unua kompakta disko produktita en nia lingvo (1988).

Balkan Diskurs
tradukis Stano Belov